



Norvega Esperantisto


ESPERANTOBLADET

N-ro 1
1969

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
35-a (40-a) jaro
Monata

Norvega Kongreso en Budor



Budor, la loko por la 41a Norvega Esperanto-Kongreso 21an kaj 22an de junio 1969. Budor situas en Løten komunumo, 615 metrojn super mar-nivelo, inter mont-paŝtejoj kaj sportkabanoj.

Budor estas ordinara, sed populara ekskursejo sur la montebenaĵo Hamarvidda.

Ĝi estas la celo por la dimanĉturisto, kaj por lernejklasoj, — aŭ

dum tagekskurso, aŭ por restado por kampadkursaranĝo.

La junularo iras al Budor dum semajnfinoj aŭ por partopreni en kampadaranĝoj, kaj multnombraj konferencoj okazis en Budor.

Koiedalen estas speciala tereno kiu apartenas al Budor, tie 10 primitivaj iamaj ripozdometoj por arbarlaboristoj estas aranĝitaj ĉirkaŭ laĝeto.

Por tiuj, kiuj volas servi sin mem, ili estas malmultekoste lueblaj. Tiuj, kiuj partoprenas en konferencoj, ordinare ne havas sufiĉe da tempo por migradi en la tereno ĉirkaŭ Budor, sed supozeble ankaŭ ili havas okazon por promenado al monto Svanen (2 km. for de Budor). De tie estas grandioza panoramo.

Por tiuj, kiuj alvenas en privataj aŭtomobiloj, estas ekskurso al la monto Nordhue (768 metrojn super marnivelo) ebla.

Sur Nordhue estas monumento pri la poeto Per Sivle, ĉar sur tiu loko li verkis sian poemon Varde.

Budor situas 30 km for de Hamar, meze en la koro de regiono Hedemarken.

BONVENON AL BUDOR.

Britt Dahl
Estrino.

Instruista ekzameno 1968

Unu kandidato anoncis sin por la instruista ekzameno kaj sukcese trapasis ĝin.

La programo de la instruista ekzameno konsistas el tri partoj, I: skriba, II: buŝa kaj III: praktika. Jen la skriba kaj praktika programoj (la buŝa ne raportita).

I Skriba parto

Ia Traktaĵo en Esperanto. La temo prenita el la Esperantomovado.

Ib Korektado de eraroj en teksto, kiu enhavas gramatikajn malĝustaĵojn.

Ic Tradukdiktaĵo. La ekzamanto diktas en norvega lingvo mallongan tekston, kiun la kandidato rekte skribas en Esperanto.

III *Praktika parto*
(Okazas prefere en kurso aŭ kluba kunveno.)

IIIa Leciono prova pri donita temo el komenca kurso.

IIIb Leciono prova pri donita temo el daŭriga kurso.

Ekzamena Komisiono de NEL.

*

NB!

En la pasinta numero la datoj de la 41a Norvega Esperanto-Kongreso en Budor — Løten estis erare indikitaj. La kongreso okazos la 21an kaj 22an de Junio 1969.

La Liga Estraro.

*



NILS H. MIDTHUS FORPASIS
La 9an de Novembro forpasis en Lidarås emerita instruisto Nils H. Midthus en la aĝo de 95½ jaroj. Li estas filo de Haldor Midthus, la fondinto de la Esperanto-movado en Norvegujo, esperantisto de 1905 kaj membroj de N.E.L. de ĝia fondiĝo. Ni deziras pacon al lia memoro.

C.S.-B.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Nova jaro

Venis la nova jaro. Kun ĝi novaj eblecoj. Se ni scias uzi ilin. Estas eblecoj inter la junularo! En la pasinta somero la anglaj skoltoj aranĝis ĵamboreon en Essex. La aranĝantoj ne estis esperantistoj, sed jam spertis, ke la angla ne sufiĉas, ĉar la scioj de neangloj estas tro malgranda, kaj la scio de angloj tro granda. Kaj ili aranĝis la ĵamboreon dulingva, kun la internacia kiel dua lingvo. Ĉio estis sukceso — nur ne la antaŭlaboroj inter partoprenantoj.

Jen nia ebleco: Ĉu ĉiu opa grupo aŭ esperantisto pripensas, ke la skolta movado havas insignon por skoltoj sciantaj esperanton? Ke la skoltoj eble nur bezonas instigon de iu?

Kaj la junulargrupoj — ke multaj penas havigi gvidantojn al studrondoj por aktivigi siajn membrojn? Kristanaj, politikaj, ktp., tio ne gravas.

Kaj ni mem. Ĉu nia scio sufiĉas,

ĉu ni sufiĉe atentis la literaturon, ĉu ni kreas eblecojn por la pluenagado post nia malapero?

Emulo

La Kontorfundajo

Pli frue	kr.	951,00
R. Bugge-Paulsen ..	»	30,00
Signe Korstvedt ..	»	19,00
Torstein Andersen..	»	10,00
Karl Karlsen	»	10,00
Trygve Reisæter ..	»	10,60
Otto Koren	»	100,00
Ingvald Dahl	»	5,00
Gustav Ringstad ..	»	10,00
Leif Belle	»	30,00
C.S.B.	»	20,00
Trygve Raimer	»	15,00

kr. 1 210,60

La propaganda Fondaĵo.

Karl Karlsen

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

HELSINGØR

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la venonta somero okazos 20.—26. de julio en

La internacia Alternejo de Helsingør, Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingør al UK en Helsinki estos aranĝata. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinki tagmeze.

Sciigoj de N. E. L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado, ni varme petas vin tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu sendi sian kotizon (kr. 20.—, familianoj kr. 10.—, junuloj kr. 7.—) al N.E.L., Boks 942, Oslo 1 (poŝtgirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi al la kluba kasisto. Kaj al la *klubaj kasistoj* ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1969, kaj ĉiukaze sendi liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj, plej malfrue en la unua semajno de Februaro. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L., La kotizo estas kr. 30.— por unu jaro. Klubanoj fariĝas subtenantaj membroj pagante kr. 15.— aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5.—). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

54a Universala Kongreso okazos en Helsinki, 26. Julio — 2. Aŭgusto 1969. Turisma Servo de N.E.L. planas komunan vojaĝon, kaj laŭ peto sendas bultenojn kaj aliĝilojn kaj akceptas aliĝojn kaj mendojn. Interesiĝantoj turnu sin al Turisma Servo laŭeble baldaŭ, por ke oni havu ideon pri la interesiĝo.

La kontorfondado ricevis malpli multe da donacoj en 1968 ol dum la antaŭaj jaroj, sed la luprezo ne malaltiĝis. Ni tial permesas al ni memori pri tiu grava donacofondaĵo. Ĉiuj donacoj estas bona helpo por la ekonomia de N.E.L.

La propagandan fondaĵon oni evidente tute forgesis en 1968, ĉar ĝi preskaŭ tute ne ricevis donacojn. Sed la estraro uzis el la fondaĵo por gravaj celoj, tiel ke ĝia kapitalo malkreskis. Ni tial permesas al ni memori la membrojn ankaŭ pri tiu grava fondaĵo.

Taskotabelo por kluboj. — *Februaro.* La studvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la Distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun pleniĝita poŝtgirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu

monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkevarono. Okazis unu estrarkunveno, kaj oni dissendis unu cirkuleron al la kluboj kaj rektaj membroj (i. a. pri donacabonoj al Norvega Esperantisto). Oni plu laboris pri la revizio de la korespondaj kursoj (per Lars Kåre Hunnes). La teksto de la norvega traduko de dok. C.E.D./7 estas skribita sur stenciloj kaj baldaŭ multobliĝota. Oni decidis ke la 41a Norvega Esperanto-Kongreso okazos en Løten 21.—22. Junio 1969 kaj komencis plani la programon. La komunuma estraro de Løten decidis nomi unu straton «Esperantovegen» okaze de la kongreso. La Turistrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo aperigis sian duan filmon kun komentarioj parolataj en Esperanto: «Oslo, la vikinga ĉefurbo». Oni plu kunlaboris en «La Norvega Komitato por la Internacia Jaro de la Homaj Rajtoj 1968». Oni decidis en 1969 reiri al la laŭstatuta kvaronjara raportado de la kluboj. Ĉar jam preskaŭ tute elĉerpiĝis la ordinara broŝuro «Det internasjonale språket — Esperanto», oni decidis presigi novan eldonon.

La Liga Estraro.

Enciklopedio de Esperanto

Grupo de esperantistoj, kies nomoj garantias altan nivelon, nun planas novan «Enciklopedio de Esperanto». Stafeto ĝin eldonos sub aŭspicioj de UEA, kiu starigis Fondaĵon por helpi al la eldono. Kontribuaĵojn oni sendu al NEL aŭ UEA (kun indiko de la celo). La Enciklopedio, kiu estos gravega dokumentilo de nia movado, estos plurvoluma. Ĉefredaktoro estos U. Lins.

Hispana Esperanto-Muzeo

Hispana Esperanto-Instituto fondis muzeon, Hispana Esperanto-Muzeo, sub gvido de Luis Maria

Hernandez Izal. Kiel la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno ĝi estas rifuĝejo por la trezoroj de Esperantujo, kaj ĉiuj donacoj al riĉigo de la muzeo estas bonvena. Adreso: Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona.

*

Miliono al U. E. A.

La «Kapitalo Hodler 68», kies celo estas havigi necesan kapitalon al nia laboro, ricevis firman bazon. Jam donacoj ĝis ĉ 90 000 kr kaj pruntoj ĝis ĉ 156 000 kr estas anoncitaj. Oni akceptas ĉiajn donacojn kaj pruntojn de 2 000 kr je rento de 2 0/0 jare.

BONA ISRAELA LIBRO

Reuven Kritz: *Freŝa Mateno*,
Tradukita de Ota Ginz.

«. . . altkvalita laŭ enhavo,
modela laŭ lingvo esperanta,
kaj ankaŭ tre aktuala pro la
multaj okazintaĵoj en tiu
lando en la lasta tempo.»
(El recenzo de Elna Matland)

Prezo kr. 13,00.

Esperantoforlaget A/S

Boks 842, Oslo 1,
poŝtĝirokonto 100.31.

RECENZOJ

William Shakespeare:

Somermeznokta sonĝo.

Tradukis Kalman Kalocsay.

Eldonis Stafeto.

Kiel kristnasko donaco alvenis la nova eldono de Stafeto, la nova brila traduko de Kalocsay. Dum miaj studentaj tagoj mi aĉetis kaj eklegis anglan eldonon de la verkoj de Skakespeare. Mi konfesas: Mi neniam sukcesis trapanetri ilin, la lingvaĵo, la stilo, ĉio kaŭzis al mi troan laboron. Ankaŭ la traduko de Kalocsay ne estas la plej facile legebla libro. Li ne evitas novajn vortojn — sed ili ja ankaŭ necesas. Kaj al la libro estas donita glosaro kaj eĉ pli valora: komentario.

Versajne ĉiu norvego aŭdis pri

tiu gaja dramo. Verŝajne malmultaj jam legis ĝin. Nun: Frandu!

Dum ni havas tiel lertan kaj kapablan tradukiston kiel Kalocsay kaj tiel bravan kaj sindoneman eldoniston kiel la estro de Stafeto, ni sciu subteni ilin.

La kajero estas la eldonnumero 60 de Stafeto. Ĝi estas finpresita decembro 1967 en mil ekz., aperis sur la merkato nur decembre 1968, kaj espereble elvendota dec. 1969.

R.

*

Bulgario, Mallonga skizo de Spas Rusinov.

De Agentejo Sofia-Press ni ricevis 120-paĝan kajeron kun historia, geografia ktp superrigardoj. La kajero estas riĉe ilustrita kaj tre belaspekta.

*

Tra la Soveta Ukrainio.

Ni ricevis multobligitan kajeron 33-paĝan. Estas n-ro 2, do temas pri periodaĵo.

*

«Antaŭen», gramofondisko publikigita de Diskografia societo de Finnlando. Mendebila ĉe Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, Irislahti. Prezo 7 F.mk.

La unu flanko de tiu gramofondisko estas kanto — aŭ pli ĝuste artikoloj el la deklaro de Homaj Rajtoj — kantita de Päivi Paunu, laŭ la stilo de la nun tiel modernaj «protestokantoj», kaj verŝajne tiu parto de la disko povos doni iom al la moderna junularo, kaj tio estos valora dono.

La alia flanko tamen, «Mi sidis kun mia virino», kantita de M.A. Nimminen, estas laŭ teksto kaj muziko tute senvalora.

Haro.

*

La Revuo Orienta

kiu venas el Japanujo, ordinare estas tute nelegebla al norvego. la revuo estas presata per ideogramoj, kaj nur hazarde oni povas rekoni vorton. Sed en la numero de aŭgusto oni trovas eĉ frazojn en la norvega! Temas pri eltondaĵo el nord-nordvega gazeto en kombino kun artikolo de japana studento, kiu vizitis nian landon.

*

Het groeiend taalprobleem estas broŝuro el Nederlando, kiun N.E.L. devus imiti. Ĝi montras, per simplaj, tute kompreneblaj bildoj, la lingvoproblemojn de la

moderna socio, kaj estas en ĉio imitinda kaj imitenda. Nur unu oni devus en posta eldono korekti: Sur kovrilo estas la nomoj de plej diversaj lingvoj, kaj inter tiuj «norge» anstataŭ «norsk».

*

Norda Prismo

estas reorganizata post la morto de la redaktoro Sczilagy, kaj nun aperadas sub redakto de W. Auld. Ĝiaj novaj numeroj montras, ke la revuo deziras konservi la kurson, kiun donis al ĝi la fondinto kaj redaktinto.

*

La Monda Lingvo-Problemo estas nova internacia, interdisciplinara scienca revuo, eldonata sub aŭspicio de CED. Ĝi aperigos originalajn studojn en diversaj naciaj lingvoj, kun resumoj en Esperanto. Jen vera tasko, facile solvebla: Abonu ĝin por niaj bibliotekoj.

La Universala Kongreso

Kotizoj, ekde la 1-a de jan. 1969:

- | | | |
|--|-------|-----------|
| 1) Kongresano neindividua membro de UEA | 77.00 | ned. gld. |
| 2) Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ) | 67.00 | » » |
| 3) Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj «Esperanto» | 57.00 | » » |
| 4) Edz(in)o de Kongresano en kat. 1) | 33.50 | » » |
| 5) Edz(in)o de Kongresano en kat. 2) kaj 3) | 28.50 | » » |
| 6) Junulo ĝis 20-jara | 23.00 | » » |
| 7) Univers. Stud. ĝis 30-jara | 38.50 | » » |
| 8) Blindulo | 31.00 | » » |

N.B. Kongresano de kat. 1) ricevas dum la tuta kongresa jaro la revuon «Esperanto».

Statistiko (je 9/12/1968). Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 2, Belg. 6, Braz. 2, Brit. 27, Bulg. 13, Ĉeĥosl. 3, Danl. 7, Finnl. 83, Franc. 34, Germ. 21, Grek. 1, Hisp. 12, Hung. 8, Isr. 1, Ital. 8, Jap. 4, Jug. 11, Kan. 1, Ned. 33, Norv. 4, Nov-Zel. 1, Poll. 8, Port. 3, Sovet. 1, Sudano 1, Sved. 21, Svis. 4, UAR 2, Usono 12. Entute 339 el 31 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

Deutscher Kulturbund

Ĉiujare okazas en Rostock (Germana Demokratia Respubliko) la internacia festivalo de la ĉeĥaltmaraj ŝtatoj, la «Baltmara Semajno». La kultura kaj sporta programo altiras ĉiujare kelkmilojn da gastoj el la nordaj landoj, kiuj travivas neforgeseblan semajnon. «Baltmara Semajno» okazos de 6. 7.—13.7.1969.

Esperantistoj ankaŭ partoprenu tiun semajnon! Ili ricevos la necesajn vojaĝmaterialojn je favoraj kondiĉoj ĉe: Den Norske Komiteen for Østersjøuka, Postboks: 51 57, OSLO N V.

Partoprenontaj esperantistoj povas viziti ankaŭ Esperanto-klubvesperojn kun specialaj programoj. Ili sin anoncu ĉe Deutscher Kulturbund/Esperanto DDR — 25 Rostock, Krøpelinestr. 25, Germ. Dem. Resp.

Korespondu!

25-jara teknikisto-mekanikisto, fraŭlo, deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn aŭ poŝmarkojn. Interesiĝas pri ĉio. Witold Konarewski, ul. Warszawska 46 m. 11, Czestochowa, Polujo.

Tóth György, Hungarujo, *Szeged*, Gyapjas Pál u. 6—8, 20-jara studento, interesiĝas pri ĉiuj temoj (ĉefe pri literaturo kaj muziko) korespondi deziras kun junulino. Mi certe respondos.

15-jara gimnaziano deziras korespondi kun gelernantoj. Intereso: lingvoj, dancmuziko, filmo, fotografaĵoj, poŝtkartoj. Tuj respondos. F.ino Judit Bellér, *Budapest XII*, Németségylvi u. 78/a, Hungarujo.

Deziras interŝanĝi bildkartojn s.ro József Dabrowski, ul. Smietowska no. 56, *Poznan*, Polujo.

15-jara mezlerneĵano deziras korespondi. Intereso: geografio, historio, naturo, libroj, filmo, stereovicio, moderna muziko; kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn kaj geografiajn revuojn. Jozef Sliacky, Horny Tisovnik 220, okr. Zvolen, Ĉeĥoslovakujo.

Studento tre ŝatus korespondi kun junaj norvegaj geesperantistoj. Peter Simunek, Partizanska 15, *Surany*, Ĉeĥoslovakujo.

Studento deziras korespondi. S.ro Muic (Matijevic) Stíte, A. Butorac 13, *Zagreb*, Jugoslavio.



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9



La 10 a feriosemajno por esperantistoj

Kiel partoprenantoj en ĉi tiu interesa kaj travivaĵplena feriosemajno mi kaj mia edzino ricevis okazon vidi kelkajn el la plej belaj regionoj de Svisujo.

Ni norvegoj ja havas montarojn, sed la svisaj montaroj estas tute alimane karakterizaj. Oni tie ne vidas grandajn, nudajn montarstepojn, kiel en Norvegujo, sed la grandiozaj montpintoj, kiuj grandparte estas kovritaj de verdaĵo kaj arbaroj, imponas ankoraŭ pli. La arbolimo atingas proksimume 1400 m.

Niaj svisaj kolegoj Ernst Glättli kaj Hans Hunkeler, kiuj ĉiujare aranĝas ĉi tiujn feriosemajnojn, faris grandan laboron por ke la partoprenantoj, 90 el 10 landoj, ricevu tiel agrablan kaj interesan restadon kiel plej eble. Ni loĝis en la feriohejmo «Ferien — Heimstätte Gwatt» ĉe la idila lago Thun. De tie ni faris ekskursojn per trajno, kablo — kaj dentradtrajno kaj ŝipo.

La partoprenantoj alvenis dimanĉe. La saman tagon okazis interkonatiĝa vespero — kiel dum niaj esperantokongresoj. Unu el la partoprenantoj, s.ro Josef Mraz de Linz en Aŭstrio, recitis en majstra maniero kaj en perfekta Esperanto poemojn kaj prozojn.

Lunde antaŭtagmeze ni banis nin aŭ remis sur la Thunlago kaj posttagmeze ni vojaĝis per fervojo al la piramidforma monto Niesen, 2336 m. Marde okazis fervojovojaĝo al Interlaken Ost kaj de tie per vaporŝipo al Brienz, de tie ni faris unu el la plej rekomendindajn ekskursojn — al la monto Brienzler — — Rothorn, 2252 m. — per dentrada vaportrajneto.

Merkrede ni vojaĝis per trajno kaj aŭtobuso al Beatushölen por rigardi la faman subteran groton Sankta Beato. Interne estas subteraj akvofaloj kaj lagoj. Poste ni vojaĝis per ŝipo al Interlaken kiu situas inter Thun- kaj Brienzlerlago.

Jaŭde okazis la plej bela ekskurso, nome al Jungfrauoch. Unue ni vojaĝis, tra Interlaken kaj Lauterbrunnen, al Wengen, kiu estas bela ferioloko, poste al Männlichen, 2220 m., kaj poste al Kleine Scheidegg, 2061 m., kaj de tie al la plej altsituanta fervojstacio de Eŭropo, Jungfrauoch, 3454 m. Vendrede estis la tago libera kaj la partoprenantoj faris ekskursojn laŭ dezire.

Sabate ni vojaĝis per la Bern — Lötschberg — Simplonfervojo al Brig kaj tie, post vizito al la fama Stockalperpalaco, disigiĝis la partoprenantoj dum la lasta tago de ĉi tiu neforgesebla feriosemajno, kiu donis al ni eblecon rigardi grandan parton de tiu lando kaj okazon renkonti esperantistojn kaj kolegojn el aliaj landoj.

Ĉi tiu feriasemajno, kiu ankaŭ estas pli

malmultekosta ol restado en hoteloj, estas ege rekomendinda, kaj ĝi ankaŭ estas ankoraŭ unu pruvo, ke pere de Esperanto oni efektive povas kontakti kun kolegoj de aliaj landoj kaj oni povas, pere de sperta kunhelpo, sen lingvoproblemoj, ricevi okazon rigardi la plej vizitatajn vidindaĵojn.

Gunnar Flenvang.

La jenaj fervojistoj de Ĉeĥoslovakio deziras korespondi kun norvegaj samidean(in)oj: Ladislav Lani, 27 jara, adreso: Nohova 6, Plzen, pri filatelio, bildkartoj, vojaĝo al fremdaj landoj.

Antonin Osoha, 40 jara, pri piedturismo, studado de horaroj, reciproka restado, adreso: U Zahradniho mesta 2849, Praha 10.

*

19-jara lernanto de Trafika Tekniklernejo deziras korespondi pri bildkartoj kaj muzikoj kun gemikoj el la tuta mondo.

Mia adreso: Kobus Ryszard, Gdansk — 6, str. Klonowicza 81, Pollando.

Norvega Kroniko

«*Mara Vento*», Haugesund okazigis la oktobran kunvenon jaŭdon la 3-an.

La kunvenon malfermis la prezidanto bonvenigante la ĉeestantojn. Ni kiel kutime komencis kontante kaj poste la sekretario legis la referaĵon.

La programulo ĉi-foje estis Olav Thormodsen. Li kune kun amikoj el Odda, Kristiansand kaj Haugesund partoprenis la kongreson en Madrido kaj nun prezentis tre interesajn kolor-lumbildojn pri Madrido kaj Toledo. La bildoj

donis bonan impreson pri la multaj belaj vidindaĵoj kiujn posedas la cefurbo hispana — Ni ekkonatiĝis al pomaj, belegaj kasteloj, plaĉaj parkoj kaj fontanoj, pentraĵoj kaj skulptaĵoj kiel ankaŭ al belegaj placoj kaj avenuoj. Per la bildoj el Toledo ni perceptis la etoson de urbo antikva kun riĉa historio. La programulo estis dankata per tuktora aplaŭdo.

La klubo ellotis nacikostume vestitan pupon (donacon de Sigv. S. Ege). La pupon gajnis St. Kjetland.

Fine estis kaftrinkado kaj vigla interbabilado.

*

«*Mara Vento*», Haugesund, kunvenis jaŭdon la 7/11-68. Post bonvenigaj vortoj de la prezidanto sekvis kiel kutime kanto kaj referaĵo.

La ĉefan programon de l' vespero prezentis s-ano Arne Alne. Estis tre interesa kaj instrua parolado kun aldonaj belaj, plaĉ-koloraj lumbildoj pri Islando kie li (pro akcidento) devis resti 7 monatojn en hospitalo. Li montris bildojn pri tipaj regionoj de la insula lando — pri la naturo unika, pri la viv- kaj loĝ-manero de la popolo, varmaj ŝprucantaj fontoj kaj sekiĝintaj lafofluoj ktp. La bonan programon la ĉeestantoj forte dank-aplaŭdis.

Dum la kunveno Sigv. S. Ege prezentis proponojn por plibonigo de la kluba ekonomio. Post ioma diskuto la proponoj estis transdonataj al la estraro por plua traktado.

Antaŭ ol hejmeniri ni kafotrinkis kaj vigle interparolis.

Ref. O. J. Rønnevig.

Jarkunveno de Nordlanda distrikto de N. E. L.

Okazis la 15-an de septembro 1968 en Bodø. Ĉeestis 17 esperantistoj el Mo, Saltdal, Sulitjelma, Gildeskål, Bodø kaj esperantista gasto el Hindujo s-ro Abani Halder.

Gvidanto de la kunveno estis J. Flodmo el Mo, kaj sekretario M. Myrvoll el Gildeskål.

S-ro Flodmo legis raporton pri la situacio de Nordlanda distrikto. La lasta jarkunveno okazigis en Mo la aŭtuno 1966 kaj la laboro kaj situacio estas tre malbona. La klubo e nMo malfondiĝis kaj la membroj aliĝis al N.E.L. kiel rektaj membroj. Al Nordlanda distrikto nun apartenas nur unu klubo kaj diversaj rektaj membroj.

La diskuto post tiu sciigo estis tre vigla, kaj la partoprenantoj admonis la Mo-anojn rekonstruu la klubon, sed vane. S-ro Skavoll el Saltdal rakontis ke li havos kursoron en sia loĝloko kaj poste fondos klubon. Se fondiĝos klubo en Saltdal eble estas eblecon fondi novan klubon en Mo. Por savi la rompitan Nordlandan distrikton la Bodø-anoj samvoĉa diris ke la estraro volonte estos en Bodø.

Jen la elekto: Prezidanto: Anna Chris. Nilssen, Bodø, Vicprezidanto: Harald Skavold, Saltdal, Sekretario: Leif Hansen, Bodø, Kasisto: Enevald Mårli, Bodø,

Ano: Egil Hunstad, Bodø, Anstataŭantoj: Ågot Pedersen, Mo, Johannes Flodmo, Mo. Revizoroj: Katrine Pedersen kaj Egil Ellingsen, Bodø.

La kalkulraporto estis abrobita sen rimarkoj.

Letero de Zaljko Takač, Zagreb, kiu ĵuste vizitis Bodø'n estis voĉlegita. Pro la situacio en lia hejmlando li devis urĝe forflugi kaj ne havis tempon viziti esperantistojn, sed li salutis ĉiujn.

Fin-fine s-ro Halder montris lumbildojn kaj filmojn el Hindujo kaj rakontis pri la lando.

acono

Klubo Esperantista en Oslo

7/11.68. La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Kari Kalsås «Kiel karavanestro en Italujo». Tre ĉarme, amuze kaj en bona Esperanto ŝi rakontis pri okazintaĵoj kaj spertoj dum ŝia laboro kiel gvidanto de karavanoj. Malofte la aŭskultantoj tiom ridis dum prelego en la klubo. Ŝi ankaŭ montris tre belan kolorfilmon, kiun ŝi mem fotografis. Ŝi rikoltis fortan kaj bonmerititan aplaŭdon.

Støp-Bowitz montris la novan Esperantlingvan kolorfilmon «Oslo — en Vikinga ĉefurbo» Tio estis ia pra-unua prezentado. La filmo estis trege bela, kaj montris la mirinde multajn allogaĵojn de nia ĉefurbo. Ivo Caprino faris la filmon, kaj aktoro Sverre Hansen ludis la ĉefan rolon kune kun la pupo Harald Hårdråde. C. Støp-Bowitz esperantigis la filmon.

18/11.68. La prez. John Berggren deziris koran bonvenon al la ĉeestantoj. Li referis leteron ricevitan de la nova Studenta Esp. Societo. Ili decidis aliĝi al nia klubo kiel studenta grupo. La grupo konsistas el proks. 15 membroj.

La temo hodiaŭ estis Esperantaj ekzamenoj.

Unue C. Støp-Bowitz klarigis pri la ekzamena regularo, la diversaj ŝtupoj — elementa, supera kaj instruista — kaj la postuloj laŭ la regularo.

Nia prezidanto John Berggren preparis sin por la instruista ekzameno kaj ĉi-vespere li faris la lastan parton de la provo: instrui daŭrigan kurson, kaj la klubanoj estis la lernantoj. La tasko estis: Enkonduko de relativaj subpropozicioj, precipe la transiro de demandaj vortoj al relativaj pronomoj.

Raportis *Harda Danielsen*

*

Sarpsborg: Dentoteknikisto Thure Resberg, multjara fidela sekretario de la Urso, fariĝis 60 jara la 4-an de januaro.

«20-jara ĉeĥa studento kun granda intereso pri Skandinavio deziras korespondi kun samaĝaj norvegaj gejunuloj pri ĉiu temo. Ladislav Kovár, U. Kostelicka 519/13, Ceska Trebova, Ĉeĥoslovakujo.»

Jam legataj en pli ol 40 landoj

«KULTURAJ KAJEROJ»

aportas interesajn legaĵojn, diverstemajn, diversdevanajn, kaj novaĵojn de la E.K.D.
«Gresillon» Baugé — 49 —
Francujo.

Provnumero kontraŭ respondkuponon al Sro P. Babin, Prezidanto de la E.K.D. 13, Bd. de la Chauvinière — 44 —
NANTES, Francujo.

*

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —

Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj. — Telefono: 54 727